

4-a Jaro
N-ro 6 (21).



Marto 1930.
Aperas dumonate.

LA JUNA BATALANTO

Organo de la Internacia
Katolika Junulara kaj Paca Movado

ELDONATA DE
MONDJUNULARO KATOLIKA, MOKA

Redaktoro : WILHELM SOLZBACHER.

ENHAVO :

Bojcc Molodoj, Sankta Patro! — E. Card. Pacelli, Letero al episkopo Majlath, protektoro de MOKA. — Mondjunularo Katolika, La Sankta Patro benis nin! — J. M. Puišys, S. S., Juna Batalantaro. — Wilhelm Solzbacher, Katolika Agado kaj Internacia Katolika Junulara Movado. — W. S., Internacia Katolika Junulara Agado (Fino). — William J. Lockington, S. J., Korpa Ekzercado. — P. Mazelis-M. Stonis, Nekonatulo. — Esperanto-novaĵoj. — Eldonejo La Juna Batalanto translo- kigita al Köln. — Nia Movado. — Leterkesto — Recenzejo.

REDAKCIO : Köln, Dagobertstrasse, 28, Germ.

Eldonejo : ELDONA KOOPERATIVO LA JUNA BATALANTO,
Köln—Dellbrück, Bensberger Marktweg 53, Germ.

Abonprezoj de "La Juna Batalanto",

Normala abonprezo : jare 2 germanaj markoj, kun MOKA-membreco 3 M. La eldonejo akceptas monbiletojn, ĉekojn, poŝtmandatojn, respondkuponojn, germanajn poŝtmarkojn.

| Lando | jara abono | kun MOKA-kotizo | simpla kotizo | Lando | jara abono | kun MOKA-kotizo | simpla kotizo |
|-----------|------------|-----------------|---------------|-------------|------------|-----------------|---------------|
| Anglujo | 2 s | 3 s | 1 s 3 d | Hungarujo | 2,4 p | 4 p | 2 p |
| Argentino | 1,50 p | 2 p | 1 p. | Italujo | 9 l | 14 l | 5 l |
| Azio | 2 s | 3 s | 1 s 3 d | Japanujo | 2 s | 3 s | 1 s 3 d |
| Aŭstralio | 2 s | 3 s | 1 s 3 d | Jugoslavujo | 30 din. | 40 d | 15 d |
| Aŭstrujo | 3,40 s | 5 s | 2 s | Litovujo | 5 lit. | 7 l | 3 l |
| Belgujo | 3,50 b | 6 b | 2 b | Luksemburgo | 18 fr | 25 fr | 10 fr |
| Brazilio | 4 mr | 5 mr | 2 mr | Meksiko | 0,50 dol | 0,75 d | 0,30 d |
| Ĉeĥoslov. | 14 kr | 20 kr | 10 kr | Nederlando | 1,25 fl | 2 fl | 0,80 fl |
| Danujo | 2 kr | 3 kr | 1 kr | Polujo | 4zł | 6 zł | 3 zł |
| Danzig | 2 g | 3 g | 1,20 g | Portugalo | 8 esc | 12 e | 5 esc |
| Francujo | 12 fr | 18 fr | 6 fr | Rumanujo | 80 lei | 100 l | 40 lei |
| Germanujo | 2 M | 3 M | 1,20 M | Svedujo | 2 kr | 3 kr | 1 kr |
| Grekujo | 38 dr | 50 dr | 15 dr | Svisujo | 2,50 fr | 4 fr | 1,50 fr |
| Hispanujo | 3 p | 4,50 p | 2 p | Usono | 0,50 dol | 0,80 dol | 0,30 dol |

Ni akceptas ankaŭ pagojn por duona jaro aŭ kelkaj jaroj. Membroj de MOKA ricevos nian jarlibron kaj aliajn publikigaĵojn. Donacoj por la subtana kaso (liverado de J. B. al malriĉuloj) estas invitataj.

Abonejoj : Krom al la eldonejo oni povas ankaŭ pagi al la naciaj sekretarioj de MOKA, kies adresojn vi trovas en alia loko de la gazeto.

Poŝtkontoj. Germanujo : Köln 480 37 (Wilh. Solzbacher, Köln) ; Francujo : Strasbourg 8180 (P. I. A. Muffang, Bourg-la-Reine) ; Aŭstrujo : Wien D 30461 (Ernst Gørlich, Wien 3).

POR PROPAGANDI NIAJN IDEOJN en la katolika junularo tutmonda, MOKA eldonas propagandgazetojn nacilingvaj. Ili devas enpenetri ĉie en la rondojn kaj asociojn. Ĉiu propagandisto portu daŭre kvanton en sia poŝto, por disdoni aŭ disvendi ilin.

« **ERWACHENDE JUGEND** » nomiĝas la **germanlingva** bulteno aperanta dumonate. La propaganda eldono B (eldono A aperas en formo de revuo) kostas nur **po 3 fenigojn**; sed oni forsendas nur minimume 25 ekzemplerojn. Mendu !

« **JEUNESSE MONDIALE CATHOLIQUE** » estas destinata por niaj **franclingvaj** amikoj kaj kostas **nur 1 francan frankon** por 10 ekz., 4 fr. por 50, 7 por 100 ekz. Mendu tuj !

En angla kaj hispana lingvoj similaj bultenoj estas nun preparataj. Interesuloj jam nun mendu ĉe la Eldona Kooperativo J. B. aŭ ĉe la kompetenta nacia sekretariejo.

La Sankta Patro benas la MOKA-movadon.



Sankta Patro, granda estro
De la tuta kristanar' !
Blankaj, flavaj, nigraj homoj,
Lignaj, ŝtonaj, feraj domoj.
Ĉiuj mondaj idiomoj
Laŭdas vin sur ter' kaj mar' !

Sankta Patro, ni vin amas,
Reĝo sur la Roma tron',
Kristsendito sur la tero,
Roko kontraŭ la infero,
Voko de la pacespero,
Gloro sub tiara kron' !

Sankta Patro, nia ligo
Sekvos vin laŭ via cel' :
Kristo reĝo en la mondo,
Lia vort' sur mont' kaj ondo,
Paco en la vasta rondo,
Amo la gvidanta stel' !

Sankta Patro, ni vin petas :
Helpu nin kaj benu nin !
Niajn korojn maltrankvilajn,
Niajn agojn sentutilajn,
Niajn zorgojn tre humilajn
Benu, benu ĝis la fin' !

Bojec Molodoj.

La Benletero el la Vatikano

SEGRETERIA DI STATO
DI SUA SANTITA.
No. 87718.

Dal Vaticano, die 15. Febr. 1930.

Ill.me ac Rev.me Domine,

Quae pia vota et gratulationes Beatissimo Patri, sacerdotale Jubilaeum feliciter peragenti, ista Consociatio juventutis catholicae « Mondjunularo Katolika » reverenter exhibuit, iucunda sane ad Illum pervenerunt.

Itaque Sanctitas Sua pro filialis amoris et observantiae testimonio meritas grates agens, fausta quaeque et salutaria omnibus sociis a Domino precatur.

Quorum interea auspex Apostolica sit Benedictio, quam tibi, concilio internationali et omnibus sodalibus catholicis libenti animo impertimur.

Ego vero, haec tibi referens, ea qua par est observantia
sum ac permaneo

Amplitudini Tuae

addictissimus

E. CARD. PACELLI, mp.

Ill.mo ac Rev. mo Domino
D. no Gustavo Carolo DE
MAJLATH, Episcopo Transilvaniensi.

Stata Sekretariejo
de Lia Papa Moŝto.
N-o 87718.

En la Vatikano, la 15 februaro 1930.

Via Episkopa Moŝto!

La piaz deziroj kaj gratuloj, kiujn al la Sankta Patro feliĉe solenanta sian pastran jubileon via katolika junulara asocio « Mondjunularo Katolika » respektoplene elparolis, je Lia granda ĝojo alvenis al Li.

Tial Lia Papa Moŝto elparolas la merititan dankon pro tiu atesto de fila amo kaj respekta atento kaj elpetas de la Sinjoro ĉion bonsukcesan kaj por ĉiuj membroj savutilan.

De tio estu intertempe signo la Apostola Beno, kiun Ni al Vi, al la Internacia Komitato kaj al ĉiuj anoj en la tuta mondo ĝojakore donacas.

Kaj mi, ĉi tion al vi sciiganta kun la deva respekto,

Al Lia Episkopa Moŝto
Msgr. G. K. de Majlath,
episkopo de Transilvanio.

estas kaj restas
de Via Episkopa Moŝto
plej sindona
mp. E. Card. PACELLI.

La Sankta Patro Benis nin

La Sankta Patro per letero de lia Ŝtata Sekretario al nia protektoro bonvolis beni la MOKA-movadon. Gojo, entuziasmo kaj dank sento pro tio devas pleniĝi niajn korojn.

En nia letero je la pastra jubileo de Lia Papa Moŝto ni parolis pri nia laboro por tutmonda amikeco kaj solidareco de katolika junularo, pri nia batalo por la paco laŭ la programo de Pio XI-a, ankaŭ pri Esperanto. Kaj la Sankta Patro akceptis nian humilan saluton « kun granda ĝojo » kaj preĝas al la Disinjoro por la realigo de niaj celoj!

La Sankta Patro preĝas por ni kaj benas nin! Tio ja ne signifas aprobon de ĉio, kion ni faris, faras kaj faros. Komprenoble ni kiel malfortaj homoj povas erari en detaloj, certe ni faris kelkfoje malĝustaĵojn en la pasinto kaj eble faros ilin ankaŭ en la estonto. Ju pli alta estas la idealo, ju pli forta la klopodado, des pli facile oni povas perdi la ĝustan vojon en iuj detaloj. Estus aroganteco, voli kovri tiajn homajn erarojn kaj neperfektaĵojn — kiujn cetere ĉiu movado povas fari — per la papa beno. — Sed la Sankta Patro elparolis sian konfidon al nia bona volo kaj al la ĝusta celo de nia movado. Kaj la preĝo de la Vikario de Kristo sur la tero estos granda helpanto de nia malgranda aro, altirante al ĝi la gracon de Dio.

Nia movado estas krucmilito, kaj ni faras ĝin kun la voko de la krucmilitistoj: « Dio volas ĝin! » Kaj al la Papo-Reĝo sur la Trono de Petro ni volas dediĉi kaj submeti nian agadon: Sankta Patro, nia celo estas via celo: servi la Reĝecon de Kristo per la Paco de Kristo en la Regno de Kristo!

Mondjunularo Katolika.

Juna Batalantaro

Ni glorie komencis niajn pacajn batalojn, kaj jam estas junaj homoj, kiuj oferas suferojn korpajn kaj animajn, tempon kaj monon, sed ili ofte eklevas la serĉemajn okulojn ĉirkaŭen al la kunbatalantoj sekvantaj. Nia agado bezonas fortan armeon ĝoje kaj ame batalantan por la Regno de Kristo en la socia batalkampo. Dum la unuaj fordonas ĉiujn siajn fortojn, eĉ estas aliaj, kiuj entute oscedadas ĝemkriante: Kiom longedaŭra la tempo, kiom da enuo! Kompatinda junularo! Ilia teda mallaborema egoismo perforte malliberigas ilian alten tendantan junan energion. Malnobla perforto! Ni devas grandanime serĉi nian laborkampon: Ni servas la Direĝon, ni estu liaj indaj heroldoj!

Ni partoprenu decide kaj kuraĝe la katolikajn sociajn entreprenojn en tiu ajn branĉo de la Katolika Agado difinita per la papo kiel « partopreno de la laikoj en la apostolado de la pastraro ». Semu, prediku la katolikajn ideojn, kiuj redonas la pacon al la animoj kaj al kiuj ni povas aldoni niajn ideojn de nia pacbatalo, tiel ni marŝos al la eterna pactegno de Kristo. Ni devas konsciigi pri nia misio, ĉar la Sinjoro komisiis al ĉiu el la homoj la gloran ŝarĝon: prizorgi la animon de la frato. Kiam iu homo sukcesas savi alian el granda danĝero, oni lin nomas savinto, dua patro. Sed ekzistas ankoraŭ pli bela, pli nobla patreco: fariĝi savinto de animoj, esti alia Kristo surtere!

Krom la diversspecaj bonfaroj, kiujn vi povas plenumi en via familio, via urbo, via lando, ni agu katolike, ni Esperantistoj devas kulturi la senton de universala frateco en Kristo, samkiel la Apostolo diradis : « Plu estu inter vi nek grekoj nek romanoj nek barbaroj nek hebreoj, sed vi ĉiuj estu fratoj en Kristo! » Ni devas senti la fratan amsenton ankaŭ al la milionoj da malfeliculoj erarantaj en la teruraj superstiĉoj, en moralaj mallumoj. Ĉu Esperanto ne povas esti ligilo kun tieaj niaj fratoj bezonantaj nian kompaton? Ĉu ni ne kapablas iel ajn montri al la kristanaro, kiel nepre necesa estas la utilega helpilo Esperanto en tiu nobla apostolado?

J. M. PUISYS, S. S., Torino.

Katolika Adago kaj Internacia Katolika Junulara Modavo.

Serĉanta kaj demandanta estas la vizaĝo de nia tempo. Nia generacio staras inter la epokoj. Malnovaj ordoj disfalis aŭ fariĝis problemaj, novaj nur vidiĝas en la mallaraj konturoj de la revo. Ni estas vokitaj, por konstrui la estonton, kaj peze kuŝas sur niaj ŝultroj la respondeco.

Mondo, kien vi iras ?

Ni vidas kaoson da fortoj kontraŭbatalantaj unu la alian, ni vidas fermentadon kaj boladon, kien ajn ni rigardas.

Kia estas nia tasko? Kie estas nia starejo?

Ni ne flugas libere en la aero. Ni havas sub niaj piedoj fundamenton neŝanceblan : la veron de Kristo, kaj havas en la koro forton nesupereblan, se ĝin portas puraj, siĉceraj kaj veremaj homoj : la amon.

Ĉu ni ne havas grandan taskon en tiu monda kaoso?

En la mondo ekzistas pli ol 300 milionoj da katolikoj, formante entute preskaŭ kvinonon de la homaro, en kelkaj landoj eĉ plimulton. Kaj pli ol 600 milionoj nomiĝas laŭ tiu, kiu estas la Vojo, la Vero kaj la Vivo.

Kial li ne estas la vero de nia mondo? Kial la homaro ne iras lian vojon kaj vivas lian vivon? Kial ?

Kie ekzistas lando en la mondo, eĉ se naŭ dekonoj de ĝiaj loĝantoj estas katolikoj, kiu havas vere kristanan socion, ekonomion kaj ŝtaton. Kie?

Ĉu ni do vidas en la mondo grandan katolikan fronton, en kiun ni povus starigi nin, batalante por Kristo kaj lia Regno ? Ĉu do ne pli vere tiu fronto estas ankoraŭ formota?

Jes, ekzistas grandaj katolikaj asocioj, potencaj organizaĵoj ; ekzistas unuiĝoj kaj ligoj, partioj kaj sindikatoj, jurnalaj kaj libroj. Sed ĉu ne preskaŭ ilia tuta forto elĉerpiĝas kaj ensorbiĝas en la defendo? Ili demonstracias kaj proklamas, montras al la mondo : Jen, ekzistas ankoraŭ homoj, kiujn ni ne jam perdis ! Ili konstruas murojn, malantaŭ kiuj la bone gardotaj kristanoj estu protektataj kontraŭ la danĝeroj de la « mondo » kvazaŭ en katolika Ghetto. Ili grandmezure organizas — protestojn. Ili eltrovis plej delikatajn metodojn por vidi, kie io katolika estas atakita, kaj laŭte ili elkrias siajn plendojn kaj protestojn. Ĉu ne estas io vera en la parolo pri la « protestanta katolikismo » ? —

Ne falskomprenu tion, kion mi diris! Kompreneble la defendo estas necesa. Sed ĝi ne rajtas fariĝi la sola, la esenca afero!

Ĉu Kristo ne diris, ke la kristanoj estu la fermento de la tuta mondo? Ĉu li ne sendis siajn apostolojn kiel ŝafojn inter lupojn? Ĉu li ne iris inter doganistojn kaj pekulinon?

Ĉu hodiaŭ oni ne ofte povus konstati, ke la katolikoj estas la pasto, kiu estas gardota kontraŭ la fermento de la « aliaj » ? Ĉu oni ne klopodas hodiaŭ, retenante la « ŝafojn », ke ili ne vidu la « lupojn » kaj estu gardataj kontraŭ ili? Ĉu do gardado kaj protekto ne fariĝis en multaj lokoj la ĉefa afero?

En tempo tiel respondecoze kiel nia ni bezonus venkofortan katolikan atakon! La Sankta Patro atentigis pri tio, vokante al la Katolika Agado.

Ambaŭ vortoj estas signifaj. Estas necese, ke ni agu, kaj due, ke tiu agado estu katolika en la tuta kaj plena senco de la vorto.

Ankaŭ en la laŭvorta senco : « Katolika » signifas « tutmonda », « universala » (kath' helen ten gen = tra la tuta mondo). Ĉu la katolikoj ne ofte enfermis sin malantaŭ la limofostoj de sia nacio? Ĉu ili tial ne grandmezure perdis la ĝustan rigardon pri justeco kaj amo en la internacia vivo?

Ĉu en tiu internacia katolika agado facile lernebla komuna helplingvo ne estus de nekalkulebla utileco kaj graveco? Kaj ĉu Esperanto ne devus esti eluzata por tiu granda celo, alvoki katolikojn ĉiulandajn al forta konscio de ilia respondeco en la hodiaŭa mondo ?

Al tio estas vokataj unuavice la **junaj** fortoj. Tiu juneco ne estas komprenata nur en la biologia senco, ĝi signifas la vigecon, vivecon, malfermitecon, decidemon de la homo.

Nia rigardo devas esti same klara, malebria kaj seniluzia, kiel nia koro devas esti varma, konvinkita, entuziasma. Al nombroj ni ne povas fidi. Nur en malmultaj vivas tiu profunda kaj vasta katolika spirito, kiu kapablas trapenetri la mondon. En silentaj monaĥejoj, en nekonataj komunumoj, en kaŝitaj soleculoj, en malgrandaj rondoj de spiritaj homoj, en senpotencaj junularaj grupoj maturiĝas pli multe da novaj fortoj ol en la bruo de la publika agado.

Ĉu ni ne estu almenaŭ unu ondo en la oceano de tiu Katolika Agado superanta la mondon, almenaŭ unu ŝtono en tiu konstruaĵo de la Regno, kiun ni preĝante sopiras, aŭ, se ni por tio ne estas indaj, almenaŭ humila ponto, super kiu la armeo de Kristo paŝados al la venko de la vero kaj amo ? —

Orate, fratres !

Wilhelm Solzbacher.

Internacia Junulara Agado.

(Fino)

8. La movado por «Mondfederacio de la Junularo».

Post la granda Mondjunulara Paca Kongreso okazinta en Eerde (Netlerlando) en 1928 tiu movado, por kunigi junularon de ĉiuj direktoj en la servo de vera kaj daŭra mondopaco, ŝajnas esti nur malmulte progresinta. La angla federacio «British Federation of Youth», kiu estis unu el la centroj de la movado, estis devigata dissolvi sian oficejon kaj

transformiĝi en pli modestan «British Youth Council». — La germana prepara komitato de la movado okazigis sur la kastelo **Freusburg** komence de aŭgusto Mondjunularan Kunvenon bone vizititan, kiu diskutis pri koloniaj problemoj. Inter aliaj ĉeestis 20-persona delegitaro de amerikaj negroj, 5 indonezianoj, kelkaj delegitoj el Hindujo, Indonezio, Hindohinujo, Ĥinujo, Palestino ktp. La plej granda parto de la ĉeestantaro estis kontraŭ kolonia imperialismo, sed ĉeestis ankaŭ porkoloniaj delegitoj, ekz. reprezentantoj de la Germana Kolonia Societo, de la «Eco'e Coloniale» en Paris ktp.

La **Mondjunulara Migrada Servo** fondita antaŭ tri jaroj havis sian internacian konferencon komence de aŭgusto sur la **Freusburg**-kastelo. Ĝi nun peras en multaj partoj de la mondo komunan migradon de gejunuloj diverslandaj. Nun ĝi speciale propagandas la starigon de «junuldormejoj» en la maniero de la germanaj «Jugendherbergen», kaj en Anglujo kaj Danujo oni jam sukcese komencis ilian organizon. Aperis presajoj en Esperanto havegblaj per MOKA.

9. Pacifista Junularo.

La **Mondjunulara Ligo** (Centrejo en Berlin) okaze de sia 10 jara ekzisto eldonis belan kaj interesan broŝuron germanlingvan «10 jaroj da pacbatalo de la junularo», kunmetita de D-ro Otto Reinemann. Ĝi donas bonan superrigardon pri la evoluo de la pacifista junulara movado. En la broŝuro oni ankaŭ vidas, kian rolon Esperanto ludis en la historio de la movado kaj oni legas raporton pri la agado de speciala Esperanto-fako. Post la morto de Ĉefsekretario Georg Schulze-Mochring (fine de 1928) la laboroj de la centrejo estas disdividitaj inter diversaj kunlaborantoj. La internacia kunveno de la asocio okazis en aŭgusto ĉe la Veilefjord en Danujo.

La **Internacia Demokrata Paca Agado** fondita de la franca katolika pacapostolo Marc Sangnier ja ne estas nura junulara organizajo, sed ĝin precipe portas junaj fortoj diverslandaj. En la unua duono de aŭgusto 1929 ĝi okazigis, preparita per la «Volontaires de la Paix» («Libervoluoj de la Paco»), skoltosimila junulara grupo de Marc Sangnier, «pacan krucmiliton» tra Francujo, kaj ankaŭ la kongreso en Bierville estis ĉefe vizitata de gejunuloj. Ĉe la novelekto de la Internacia Komitato multaj gvidantoj de katolika junularo estas elektitaj, inter ili multaj MOKA-anoj (ekz. Kurt Döbler, D-ro Nikolaus Ehlen, Ernst Görlich, Theo Hieronymi, Wilhelm Solzbacher, Georg Wagner, D-ro M. J. Metzger).

La **Paca Institucio Marienau** kun la sekretariejo en Louisenthal (Saarregiono) kaj la bieno Hoppstätten ĉe Trier (Germanujo) volas prepari junajn gvidantojn al paca servo. Ĝin fondis pastro Franz Gebhard, kaj ĝi estas en konstantaj rilatoj al junulmovadoj, speciale en Germanujo kaj Francujo. (Nu tempe tie ankaŭ troviĝas nia palestina MOKA-sekretario Maximinus Schmoller).

La **Internacia Frataro por Repacigo** (sekretariejo nun en Wien, antaŭe en London) preparas por 1930 internacian orienteŭropan junularan tendaron en la servo de la mondspaco en Polujo.

La **Internacio de Militkontraŭuloj** (War Resisters' International, sekretariejo en Anglujo) fondis «Junularan Ekzekutivon» sub gvido de Harold Bing kaj speciale alvokos la junularon.

Mondjunularo Katolika (MOKA) estas pritraktata inter la katolikaj organizajoj.

10. Studenta Junularo.

La **Internacia Studenta Konfederacio** (CIE) okazigis en aŭgusto sian kongreson en Budapeŝt. Ĝi nun havas 34 naciajn asociojn aliĝintajn kun 1 miliono da membroj kaj estas la plej grava organizajo, ekz. por intertraktado kun la Ligo de Nacioj.

La **Tutmonda Federacio de Kristanaj Studentoj**, la plej malnova internacia studenta organizajo nun ekzistanta, havas 43 naciajn sekciojn kun 300.000 membroj. Laŭstatute ĝia ekzekutiva komitato nur povas decidi, se almenaŭ tri kontinentoj estas reprezentitaj. Ĝi volas esti internacia, interkonfesia kaj interrasa. Fakte ĝi estas preskaŭ ekskluzive protestanta organizajo, kvankam en kelkaj landoj ĝi ankaŭ havas katolikajn membrojn.

La **Internacia Studenta Servo** estiginta el la Studenta Helpinstitucio de la postmilita tempo organizis en Francujo kaj Centra Eŭropo du interesajn internaciajn studkonferencojn, kiuj ĉefe diskutis la rasproblemon.

La Ligo de Nacioj kunlaboras en studentaj aferoj krom kun la nomitaj organizajoj ankaŭ kun la **Universala Unuiĝo de Judaj Studentoj**, la **Internacia Unuiĝo de**

Studentoj por la Ligo de Nacioj, la **Internacia Unuiĝo de studentaj virinoj** kaj la **PAX ROMANA**, Tutmonda Ligo de Katolikaj Studentoj.

Pri **PAX ROMANA** ni raportas inter la katolikaj asocioj, pri la **Internacia Socialista Studenta Unuiĝo** inter la socialista junularo.

11. La skoltoj.

La **Internacia Skolta Oficejo** en London organizis en la unua duono de aŭgusto gigantan internacian jamboreon en Birkenhead (Anglujo). Ĉeestis pli ol 50.000 skoltoj el ĉiuj landoj de ĉiuj kvin kontinentoj. En la katolika festa diservo Kardinalo Bourne de London-Westminster mem predikis.

En **Barcelona** sur la Montjuich-monto okazis fine de aŭgusto internacia skolta tendaro invitita de la hispana registaro. Ĉeestis pli ol 5.000 skoltoj el Eŭropo, Ameriko kaj Afriko. (Ĝeamikoj vizitintaj la MOKA-kongreson en Barcelona kun ĝojo rememoros siajn renkontojn kun la afablaj skoltoj ĉiulandaj, la redaktoro de **JUNA BATALANTO** ekz. ornamis sian ĉambron per bela — termometro, donacita de la skoltoj de Ĉilio dum lia vizito en iliaj tendoj).

La **Internacia Katolika Skolta Oficejo** estos priskribata inter la katolika junularo, la **ruĝaj pioniroj troviĝas** inter la komunista junularo, la «**ruĝaj falkoj**» (socialistaj skoltoj), kvankam jam ekzistante en diversaj landoj, ankoraŭ ne definitive internacie grupiĝis, la **Tutmonda Ligo de Judaj Skoltoj** (Centrejo en Palestino kaj Warszawa) havas cionistan tendencon.

12. Esperantista Junularo.

Tutmonda Esperantista Junulara Asocio (sekretariejo en Leipzig) eldonas la gazeton «**Esperanto-Junularo**».

Skolta Esperantista Ligo (sekretariejo en Anglujo) bone propagandis antaŭ kaj post la Internacia Skolta Jamboreo en Birkenhead kaj eldonis bonegan specialan numeron de sia internacia organo «**Skolta Heroldo**» (redaktata de Pastro Ramboux en Paris).

Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista (IKUE) dum sia kongreso en Praha elektis komitaton, «por studi la gajnadon de la junularo». Ĝi konsistas el Pastro Font-Giralt (Gerona), Elisabeth Champy (Bruxelles), Emily A. Mann (London), Jan Filip (Praha) kaj Pastro Modesto Carolli O. F. M. (Bisseto).

Mondjunularo Katolika (MOKA) kun sia organo **LA JUNA BATALANTO** estas ankaŭ ĉi tie nomota. Fakte ĝi ja estas la Esperantista Katolika Junulara Asocio.

13. Protestantista Junularo.

La **Mondligo por Amikeca Agado per la Eklezioj** okazigis sian unuan internacian junularan kunvenon fine de aŭgusto en la germana kastelo Westerburg. Ĉeestis preskaŭ 70 delegitoj el Anglujo, Nederlando, Skandinavaj landoj kaj Germanujo, la ĉefparolantoj estis la angla episkopo Ripon kaj la germana universitata profesoro D-ro Wilhelm Stählin. Jen la temo: «Kia sinteno al kristanismo kaj eklezio estas observbla en la juna generacio de la diversaj landoj?» Kaj la respondo: «Ĉie kriza sento, tempoj de la disiĝo kaj decido, akra kritiko je la tradicio, precipe je la eklezio kaj ĝia disigiteco kaj malmoderneco, konscia volo al aktiva laboro, al solvo de la grandaj aktualaj problemoj kaj al serioza luktado pri la fundamentaj veroj de la Evangelio.» Oni ankaŭ ekkonis la gravecon de la problemoj pri paco kaj milito.

La **Internacia Federacio de la Unuiĝoj de Kristanaj Junaj Viroj** havis internacian kunvenon en Suda Anglujo, 22—30 junio 1930 okazos internacia konferenco en la kastelo Wernfels ĉe Nürnberg (Germanujo).

La Internacio de Kristanaj Junviraj Unuiĝoj, la **Internacia Ligo de Kristanaj Junulinaj Unuiĝoj** kaj la Tutmonda Federacio de Kristanaj Studentoj aranĝis komunan konferencon por la internacia gvidantaro.

Kunsido de **redaktoroj de kristanaj junularaj gazetoj** okazis laŭ invito de la Internacia Federacio de Kristanaj Junviraj Unuiĝoj la 23 aŭgusto en Basel. Ĉeestis redaktoroj el Nederlando, Francujo, Svisujo (german- kaj francalingva), Aŭstrujo kaj Germanujo. Oni decidis internacian interŝanĝon de artikoloj kaj klišoj, plibonigon de internacia informservo. La gazetara komitato de la Stockholma movado estas petita, akceli pli bonan reprezentadon de la junulara gazetaro en la naciaj gazetaraj komitatoj.

14. Katolika Junularo.

La Internacia Katolika Ligo de la Virina Junularo estis invitinta sian kongreson por fine de aŭgusto al Roma. Bedaŭrinde ĝi same kiel la Internacia Katolika Virina Kongreso ne povis okazi (pro malfacilaĵoj en Italujo) kaj do devis esti prokrastata ĝis printempo 1930. Ĝi okazos en aprilo.

«**Juventus Catholica**» (Roma Junulara Internacio) bedaŭrinde ankoraŭ ne povis rekomenci sian agadon.

PAX ROMANA. Tutmonda Federacio de Katolikaj Studentoj, havis sian 9-an internacian kongreson komence de septembro en Sevilla kaj organizis kun ĝi bonege sukcesintan vojaĝon tra la bela Hispanujo. En la kongreso oni decidis, estonte pli multe zorgi pri la praktika detala helplaboro por katolikaj studentoj. La sekvonta kongreso de PAX ROMANA estos en Germanujo.

Mondjunularo Katolika (MOKA) unuiganta katolikan junularon tutmondan al paca agado organizis mem kvar internaciajn konferencojn 1929 en Venlo (Nederlando), Louvain (Belgujo), Torino (Italujo) kaj Barcelona (Hispanujo). Krome ĝi kunhelpis en multaj aliaj internaciaj kongresoj kaj povis gajni multajn novajn kunlaborantojn, precipe en eksterŝtataj landoj.

La **Katolika Gimnastika kaj Sporta Internacio** (Internacia Unuiĝo de Katolikaj Asocioj por Korpa Eduko, fondo en Nancy 1911, sekretariejo en Paris) organizis kun la Sankta-Venceslao-Tagoj de la ĉeĥoslovaka «Orel» Internacian Katolikajn Olimpiadon en Praha fine de junio. Ĝi brile sukcesis kaj estis giganta demonstracio de la katolikismo. Multaj episkopoj, ŝtataj ministroj kaj aliaj eminentuloj partoprenis.

La **Internacia Katolika Skolta Oficejo**, fondita de la grafo Mario di Carpegna en Romo kaj nun administrata de la Katolika Skolta Asocio de Francujo, havas la taskon, reprezenti la katolikajn interesojn en la Internacia Skolta Oficejo en Londono. Estas aliĝintaj kvin landaj asocioj (Belgujo 6080 membroj, Luksemburgo 1300, Francujo 12130, Aŭstrujo 1112, Italujo 27900). Ĝi povis fari multe da bono. Kiam ekz. en unu lando (Portugalo) en la neŭtrala skolta asocio montriĝis tendencoj danĝeraj al la katolikoj kaj nove fondita katolika skolta ligo ne ricevis la konfirmon de la Londona oficejo, la pariza katolika oficejo povis sukcese reordigi la aferon.

La **Katolika Junmetiista Asocio** (Kolping-Societo) kun la centro en Köln ankaŭ estas internacia asocio. Laŭ ĝia antaŭ nelonge aperinta «manlibro», ĝi nun havas en 15 landoj (Germanujo, Aŭstrujo, Hungarujo, Svisujo, Nederlando, Ĉeĥoslovakujo, Polujo, Jugoslavujo, Rumanujo, Italujo, Danzig, Belgujo, Luksemburgo, Norda Ameriko kaj Suda Ameriko) unuigojn, membrojn kaj proprajn domojn.

Ĉi tie ankaŭ estu nomata la **I-a Internacia Kongreso por Senalkohola Junulara Eduko** okazinta 29 novembro-1 decembro 1929 en Münster (Germanujo), krome ni atentigu pri la **Internacia Unuiĝo de la Asocioj por la Protekto de la Junulinoj** (sidejo Fribourg-en-Svisujo) kaj pri la **Sectio Juventus** en la **Internacia Katolika Karita Unuiĝo**.

15. Aliaj Asocioj.

El la aliaj internaciaj junularaj asocioj, kiuj pro manko de loko aŭ pro manko de novaj fidindaj informoj ne estas pritraktitaj, ni donu almenaŭ la nomojn de la sekvontaj: **Internacia Komitato de la Kvakera Junularo** (Londono), **Tutmonda Ligo de Junaj Teozofianoj** (Londono), **Tutmonda Ligo de Juda Junularo** (Warszawa), **Tutmonda Alianco de Musulmana Junularo** (Kairo), **Tutmonda Unuiĝo de la Bahai-Junularo** (Hamburg kaj Haifa), **Ligoj de Boneco** (Paris), **Internacia Unuiĝo de Ruĝkruca Junularo** (Genève), **Internacia Junulara Sekretariejo kontraŭ la Alkoholismo** (Hamburg), **Internacia Kontraŭalkohola Studenta Unuiĝo** (Usono), **Mondjunulara Laborkomunumo por Vivreformo** (Lorchhausen en Germanujo). — Antaŭ nelonge jurnalaj raportis, ke la **framasonoj** intencas organizi en la jaro 1930 internacian junularan kunvenon, por fondi internacian ligan de framasona junularo. W. S.

NOVA ADRESO

de la eldonejo J. B. : Köln-Dellbrück. Bensberger Marktweg 63. (Regina Reiff). Nova poŝtĉeka konto : Köln 480 37 (W. Solzbacher, Köln).

KORPA EKZERKADO.

Inter la spiritaĵoj grandeguloj de la grekoj troviĝas Sokrates, gvidanta figuro efikanta ankoraŭ hodiaŭ, kvankam li vivis antaŭ 2300 jaroj. Sokrates estis viro «toleranta plej longajn fastojn kaj simplan soldatan nutraĵon: li posedis gigantan forton kaj sanon kaj superis ĉiujn virojn je korpa persistemo.»

Lia lernanto Platon opiniis, ke viro, kiu nur la spiriton kaj ne la korpon kulturas, estas kriplulo. «Li posedis fortan korpon, ekzercis sin en la gimnastiko kaj atingis tian forton kaj lertecon, ke li konkursis pri la premio en la Istmaj Ludoj.»

La elokventa oratoro Demosthenes iris kaj kuris sur montojn, por fortigi sian korpon. Ĉar amiko estis malkovrinta al li la kaŭzon de lia komenca malsukceso: «Vi ne preparas vian korpon per ekzercado por la laboro sur la oratora parolejo, kaj pro via komforto kaj senzorgeco via parolado estas laca kaj malentuziasma.»

Ĉe la najbaroj de la grekoj, la romanoj, troviĝas en la unua vico Cicero, la majstro de la oratoroj. En la juneco li estis delikatkorpora viro kun malforta voĉo, kaj lia pasia temperamento estus baldaŭ pereinta tiun korpon. Per laŭplana ekzercado li plifortigis ĝin «kaj gajnis per tia traktado de sia korpa konstitucio sufiĉan provizon da sano kaj forto por la grandaj laboroj kaj penoj, kiujn li poste entreprenis.» En liaj libroj ni trovas la frazon: «Sole la ekzercado konservas la entuziasmon de la animo kaj la vigecon de la korpo.» Lia voĉo ankoraŭ hodiaŭ sonas tra la tuta mondo.

Samtempo de Cicero, Julius Caesar, vidis, kiom korpaj malfortoj malhelpis lin, kaj «serĉis rimedojn kontraŭ sia malforteco en la milita vivo; li klopodis fortigi sian korpon per longaj marŝoj kaj simpla nutrado.» Oni scias, kiel li sukcesis.

La saman observon ni faras en postaj tempoj. Napoléon, novtempa Caesar, estis «homo el ŝtono kaj fero, kiu povis resti 16 aŭ 17 horojn sur ĉevalselo kaj povis marŝi kelkajn tagojn sen nutraĵo kaj ripozo, homo kun la rapideco kaj lerteco de tigo.» Maitland priskribas lin «homo eksterordinare forta, kun bona korpa konstitucio, 170 centimetrojn alta.» — Lia granda malamiko Wellington manĝis malmulte kaj piediris multe.

Gladstone ĉiutage ekzercadis sian korpon, kun la sukceso, ke en aĝo, kiam liaj iamaj lernejakamaradoj jam estis mortintaj aŭ kun mizera restaĵo da vivo atendis la morton, li regis grandan nacion. La grandioza paroladon, kiu fermis la duan legadon de la Home Rule Bill (leĝo pri memregado de Irlando), li faris 83-jara. Tamen la maljunulo ankoraŭ posedis fajron, kiun la parlamento ne povis rezisti. Gladstone formadis sian korpon per piedirado kaj regula ekzercado. Dum sia agado en la parlamento li ĉiutage du horojn promenis, egale ĉu pluvis aŭ sunbrilis. 80-jara li dehakis kverkon de 1,20-metra diametro. Evidente li kredis je la vortoj de Horace Greeley: «La hakilo estas la plej saniga instrumento, kiun la homo prenas en sian manon. Tio valoras speciale por tiuj, kiuj daŭre skribadas aŭ sidante laboradas. Ĝi malantaŭenigas la ŝultrojn, disigas la bruston, plilarĝigas la pulmojn. Se ĉiu junulo kaj ĉiu viro inter 15 kaj 50 jaroj ĉiutage dum du horoj povus movi la hakilon, malbona digestado malaperus el la mondo kaj reŭmatismo maloftiĝus. Mi estas malriĉa lignohakisto, sed la hakilo estas mia kuracisto kaj mia plezuro. Ĝi donas al la spirito ĝuste sufiĉe da okupo, por ne fali en sonĝadon aŭ pezajn pensojn, kaj ĉiu muskolo de la korpo ricevas sufiĉan, sed ne tro penan ekzercon.»

Tio estas nur malmultaj ekzemploj, sed ili sufiĉas por montri, kian rolon ludas sana, vigla korpo, se oni volas gajni potencon super aliaj.

William J. Lockington, S. J.

(el la libro «Per korpa ekzerco al spirita forto».)

NEKONATULO.

La homoj ridetis kaj amuziĝis, sed vi, mia kara, staris senfine malgaja kaj restis nemovata. El viaj okuloj nur larmoj falis.

Diskrete mi venis al vi, prenis viajn manojn kaj atendis, ke vi rigardetis al mi. Viaj okuloj rigardis teren.

Mi volis diri la vorton, sed ne povis, ĉar tremis miaj lipoj kaj ĉagreno premis la koron.

Post tio vi levis viajn okulojn. En la okuloj bruis la fulmo de la doloro. Mi eksentis vian potencon kaj staris kontraŭ vi kvazaŭ la plej granda senvirtulo.

Mi opiniis, ke vi estas sanktulo, kaj la aliaj homoj estas nur la suferantoj de la infero.

Ni ambaŭ venis rekte laŭlonge de la vojo. Ĉirkaŭe bruniĝis la kampoj. El la ĉielo falis nebulo.

Apud la arbaro staris kruco. Vi levis vian ĉapon kaj adonis.

— Vi estas kristano? — mi demandis.

— Jes!

Mia sango malvarmiĝis. Mi ekĉinuis, sed ne pri vi, sed pri la senkora mondo, kiun vi tute forlasis.

— Diru, kial estas tiu malfeliĉo? —

— Ne demandu min! Feliĉon kaj malfeliĉon mi tute ne konas. Mi konas nur la solan mizeron, kiu min akompanas de loko al loko.

— Ho benatulo! — ekkriis mi kaj trakuris vin de la kapo ĝis la piedoj.

Vi remontris kiel sendito el la ĉielo. Via vizaĝo estis maljuna kaj sulka, viaj manoj kalaj, kaj via koro — koro varma, kiel fajromonto.

Kaj mi diris:

— Iru kun mi, la filo de la tero! Mi donos al vi larĝan kampon, altan kastelon, silkan veston kaj multajn bongustajn manĝojn. —

Vi respondis:

— Lasu min en trankvilo! Mi estas libera, kaj liberecon mi konfesas. Via riĉaĝo ne logas min. —

Mi ekhontis kaj diris:

— Nobla homo! Mi amas vin kiel animo la ĉielon, kiel floro la roson, kiel malvarma tero la printempon. Mi nenion volas. Nur lasu min migri kun vi! —

— Sciŭ, se mi ploras, mi ne ploras tial, ke la mizero premas min, ne! Mi pioras, ĉar ne estas homoj, ĉar estas nur sklavoj de malforteco kaj malboneco. —

— Mi ne sklaviĝos. Mi iros tien, kien vi gvidos min. —

— Tamen vi estas senforta, kum mi vi ne povas... —

— Mi ĵuras, ke mi povos. —

— Ho ne! Mi manĝas panon kun akvo kaj trinkas la maldolĉan larmon. Mi dormas sur malmola lito kaj ŝirmas min per arbofolioj kaj odoraj poroj de la herbejoj. Ĉielo — mia patrujo. Tero — la ekzilo! —

— Jes, mi estas vere senforta. Via vivo estas malfacila. Inter montoj estas via paradizo. Mi ne povas rezigni mian...! —

— Tiam decidu! —

Kaj vi, nobla homo, foriris kiel ombro, kaj mi restis sola. Tagon kaj nokton mi vidas vin, mi aŭdas viajn vortojn.

En mia animo bruis granda vento.

Kaj kiam denove vi revenos, mi jam iros post vi!

— Reiru, ho nekonatulo! Mi atendas vin!

P. Mazelis,
trad. el litova lingvo M. Stonis.

ESPERANTO-NOVAĴOJ.

En ĉi tiu rubriko ni pro manko de loko nur povas publikigi tiajn novaĵojn, kiuj plej interesas nian movadon.
RED.

La Libervola Helpservo por la subakvigitaĵoj de Svisujo kaj Liechtenstein, kies alvokon ni publikigis, kiun partoprenis kelkaj el niaj amikoj kaj kiun an'aŭ la internacia sekretario de MOKA vizitis, nun publikigis raportlibron. Ĝi enhavas artikolojn en germana, angla, franca, dana kaj ĉeĥa lingvoj, sed ĉiun artikolon sekvas resumo en Esperanto. La tabeloj estas verkitaj ekskluzive en nacia lingvo kun internacia traduko en Esperanto. Internacia Esperanto-Servo skribas pri tio: « La verkisto de la estonto, kiu ne preferos tuj skribi en Esperanto sian verkon ankaŭ destinitan por la eksterlando, certe uzos kun granda profito la metodon de tiu interesa raporto ».

La registaro de la Prinĉlando Liechtenstein decidis eldoni poŝtkartojn kun bildoj, kies klariga teksto estas en germana lingvo kaj Esperanto. — Cetere tiun saman metodon jam ofte uzis Soveta Rusujo.

La komunista ilustrita semajna gazeto AIZ (Laborista Ilustrita Gazeto) nun jam de longa tempo aperigas sian lastan paĝon « El tuta mondo » dulingve (germane kaj Esperante), tiel farante bonegan propagandon. — **La proletariaj (plejgrandparte komunistaj) Esperantistoj** nun sentas sin sufiĉe fortaj por eldoni propran edukistan gazeton sub la nomo « Sennaciica Pedagogia Revuo ». — Krome ili havas s'an multlegatan semajnan gazeton « Sennaciulo », monatan literaturan kaj popolsciencan revuon « Nova Epoko », grandkvante presatan ekzercogazeton por komencantoj « La lerranto » kaj dekajn da naciaj organoj, ekz. en Britujo, Bulgarujo, Aŭstrujo, Germanujo, Hungarujo, Norvegujo, Rusujo, Svedujo. Fine kelkaj Esperanto-gazetoj en Japanujo tre simpatias la komunismon.

La Anarkiŝta Junulara Internacio publikigas s'an **Informservon** (cetere tre lerte redaktitan) nur en Esperanto — Ankaŭ la anarkiŝta gazeto « Libera Laboristo » denove aperas en Berlino.

Plej diversaj sektoroj subakvigas la Esperantistaron per siaj literaturaj kaj gazetoj. La japana religia movado « Oomoto » posedas ne malpli ol 3 Esperanto-gazetojn (« Oomoto Internacia » en Eŭropo, « Oomoto » kaj « Verda Mondo » en Japanujo), la « Blankaj Fratoj » eldenas « Nova Kulturo », la Bahajanoj « La Nova Tago », la Rozkruĉitoj « La Rozumata Kruco », la Teozofianoj « Espero Teozofia », la Bibliostudentoj « La Ora Epoko », in iam protestanta pastro « Unuigita Tuthomaro ». Aperas protestanta « Eklezia Revuo », organo « Hebrea Esperantisto ». Kaj ĉiam denove elvenas novaj adventistaj, okultistaj ktp. presadoj.

Kaj la katolikoj? Por ili aperas ĝenerala gazeto « Espero Katolika » en Paris, pli speciala « La Juna Batalanto » en Köln, krome ekzistas naciaj propagandaj organoj de IKUE (« Nederlanda Katoliko », « Brita Katoliko » kaj « Informoj en Wien ») kaj de MOKA (« Erwachende Jugend » en Germanujo, « Matena Stelo » en Ĥinujo, « La Jeunesse Mondiale Catholique » en Francujo, krome ĵus nun fondataj bultenoj en hispana kaj angla lingvoj). Sed la praktika uzo en la internacia katoŝika agado? Multe, preskaŭ ĉio estas ankoraŭ farota! Antaŭen!

Esperanto kaj Ligo de Nacioj. Prof. D-ro Teich en Saarbrücken aperigis propagande grafikan karton, kiu klarigas la organizon de la Ligo de Nacioj. Ĝi montras la diversajn sekciojn de tiu grava politika institucio. La klariga teksto estas skribita en angla kaj franca (oficialaj lingvoj de la Ligo de Nacioj) kun apudflanka traduko en Esperanto. La karto ankaŭ aperas en aliaj lingvoj kun traduko en Esperanto.

PAGU! PAGU! PAGU! Sen via mono LA JUNA BATALANTO ne povas vivi! Sendu abonkotizon kaj donacon por ĝia Jubilea Kolekto!

LA EFIKECO de via laboro por MOKA vidiĝas per la nombro de J. B. - abonantoj, kiujn vi varbis!

LA JUBILEA KOLEKTO de J. B. atendas vian donacon!
Helpu vian gazeton!

Internacia Esperantista Laborkomitato por Senalkohola Kulturo estas fondita dum la pasintjara Universala Kongreso de Esperanto en Budapeŝt. Nia amiko Walter Mudrak (Wien VIII., Strozsigasse 19/18) estas sekretario kaj petas helpon de gesamideanoj. La celo estas (mallongigite), enkonduki la plaktikan uzon de Esperanto en la kontraŭalkoholan movadon kaj atentigi la Esperantistojn pri la danĝeroj de la alkoholiĝo, tiu granda malamiko de popola sano, kulturo, moralo kaj personala libereco. La komitato jam havas delegitojn en Aŭstrujo, Bulgarujo, Danujo, Hungarujo, Jugoslavujo, Nederlando, Polujo.

La Internacia Transportlaborista Federacio (socialista) organizis enketon, ĉu ekzistas intereso por la eldono de ĝia organo en Esperanto. Ricevinte nur 143 enskribojn el 16 landoj, ĝi nur parte povas realigi la eldonon de tia faka revuo. La federacio eldonas en Esperanto la gazetsciigojn, kiuj nun aperas en franca, angla, germana, hispana kaj sveda lingvoj.

La greka Ministro de Publika Instruado dissendis cirkuleron al ĉiuj ĝeneralaj inspektoroj, permesante la Esperanto-instruadon en la pli altaj lernejoj. — **La Nacia Unuiĝo de Anglaj Instruistinoj** dum sia kongreso en Canterbury akceptis rezolucion, postulante la akcepton de internacia helpa lingvo kaj ĝian instruadon kiel dua lingvo en ĉiuj lernejoj.

Eldonejo LA JUNA BATALANTO translokigita al Köln.

La ĝisnuna eldonejstro August Günther translokiĝos denove al Berlin kaj tial ne plu povos fari la eldonejajn laborojn. En kunsido de la Eldona Kooperativo LA JUNA BATALANTO okazinta en Köln la 11/12 januaro estas decidite transigi la sidejon de la eldonejo de Werl al Köln, tiel ankaŭ plifaciligante la regulan kunlaboron kun la redakcio. Kiel estraro estas elektitaj Hugo Oelbracht, Regina Reiff kaj Wilhelm Solzbacher, la adreso estos:

Eldonejo LA JUNA BATALANTO, Köln-Dellbrück, Bensberger Marktweg 63, la teknikan gvidon havos Regina Reiff. Kiel poŝtĉeka konto germana servos tiu de Wilhelm Solzbacher: **PSK Köln 480 37 (W. Solzbacher, Köln)**.

Estonte oni povos, por ŝpari afrankon, sendi sciigojn al eldonejo, redakcio kaj Internacia Sekretariejo de MOKA al unu sama adreso (do aŭ al R. Reiff aŭ al W. Solzbacher), sed oni ĉiam uzu apartajn leterfoliojn.

La nova estraro de la eldonejo promesas uzi sian tutan forton, por prosperigi nian aferon kaj nian karan gazeton. Ni volas fari nian devon. Ni petas vin, karaj gekunlaborantoj tutmondaj, fari la vian!

Per la sekvonta numero komenciĝos la nova jarkolekto. **Sendu tuj vian abonkoton!** Kaj bonvolu ankaŭ atenti nian jubilean kolekton por J. B. anoncitan sur paĝo 67 de la decembra numero. Ni jam ricevis de kelkaj amikoj ĝojigajn donacojn, la liston ni publikigos en la aprila numero. Geamikoj, helpu nin!

Kaj ne forgesu gravan devon: Varbu novajn abonantojn!

Eldonejo LA JUNA BATALANTO,

La estraro: Hugo Oelbracht, Regina Reiff, Wilh. Solzbacher.

Nia Movado.

REGULARO DE MONDJUNULARO KATOLIKA (MOKA)

akceptita de la VI-a Internacia Kongreso de MOKA en Barcelona.

1. Mondjunularo Katolika estas internacia ligo de katolikaj gejunuloj. Ĝia celo estas la internacia kunlaborado de katolikaj gejunuloj ĉiulandaj kaj la agado por la internacia kaj socia paco laŭ devizo de nia Sankta Patro « Pax Christi in Regno Christi », « La Paco de Kristo en la Regno de Kristo ». Ĝi volas krei personajn rilatojn inter junuloj ĉiulandaj kaj fondi praktikajn instituciojn ĉiuspecajn.

2. La ligo konsistas el naciaj ligoj, lokaj grupoj kaj individuaj membroj. Ekzistas aktivaj, subtenantaj kaj korporativaj membroj.

3. En ĉiu loko, kie ekzistas membroj, ili elektas delegiton, kiu estas respondeca pri la interrilatoj kun la centraj oficejoj kaj pri la agado de MOKA en sia loko.

4. La naciaj ligoj akceptas mem siajn regularojn.

5. La internacia estraro konsistas el la episkopo-protectoro, la Internacia Komitato kaj la Ekzekutiva Komitato de la Internacia Oficejo.

6. La Internacia Komitato konsistas el la internacia sekretario kaj la naciaj sekretarioj.

7. La internacia sekretario estas elektata de la Internacia Komitato por la daŭro de du jaroj. Li estas reelektebla.

8. La internacia sekretario proponas el la nombro de la kunlaborantoj loĝantaj proksime al lia urbo la membrojn de la Ekzekutiva Komitato. Ilia elekto fariĝas valora post aprobo per la aliaj membroj de la Ekzekutiva Komitato kaj per la Internacia Komitato. Membro de la E. K., kiu ne plu havas la konfidon de la I. K., devas eksigi. Ĉiu membro de la E. K. havas specialan fakon en la internacia organizo kaj devas regule ĉeesti la kunsidojn de tiu komitato.

9. La voĉdono de la I. K. okazas per cirkuleroj (nerespondo valoras kiel aprobo) kaj per kunsidoj dum la kongresoj de MOKA. Membroj de la E. K. ricevas ĉiujn komunikajojn al la membroj de la I. K. kaj rajtas ĉeesti ties kunsidojn, sed ne havas voĉdonrajton.

10. Kongreso de MOKA okazas maksimume en ĉiu dua jaro kaj minimume en ĉiu tria jaro. Lokon kaj daton decidas la I. K.

Krom tiuj oficialaj kongresoj MOKA aranĝas internaciajn specialajn konferencojn, limkunvenojn, laboremajnojn, kursojn, ktp.

11. La oficiala internacia lingvo de Mondjunularo Katolika estas Esperanto. En ĝi devas esti redaktataj ĉiuj internaciaj oficialaj komunikajoj kaj la oficiala organo.

Internacia Oficejo.

Nia alta protectoro, Msgr. Majlath, episkopo de Transilvanio, kun granda ĝojo sciiganta al la Internacia Sekretariejo la leteron de la Sankta Patro presitan en la komenco de ĉi tiu numero, sendas al la MOKA-anaro tutmonda siajn bensalutojn.

Internacia Komitato. Cirkulero I. K. 4 estas dissendita en februaro al la naciaj sekretarioj kaj internaciaj kunlaborantoj. Cirkulero I. K. 5 aperos en marto aŭ aprilo. Se ĉi erare ne ricevas ĝin, li skribu!

Ekzekutiva Komitato. Lasta kunsido en Köln, 11/12 januaro 1930.

Financoj. Preparante kelkajn pli grandajn laborojn, la I. O. bezonas monon. Ne forgesu pagi viajn membrokotojn! Ankaŭ donacoj estas ĝoje ricevataj.

Jara raporto pri la agado de la Internacia Sekretariejo de MOKA en 1929 estas publikigita en angla lingvo kaj en Esperanto. Ahlingvaj eldonoj sekvos. Ilin dissendas kontraŭ sendo de Internacia Respondekupono la I. O.

Kongresoj kaj kunvenoj. Ankaŭ en ĉi tiu jaro MOKA publikigos listojn de internaciaj konferencoj. La unua eldono estos enpresata en la aprilan numeron de J. B.

Eldona Kooperativo LA JUNA BATALANTO.

Kunsido de membroj okazis la 11/12 januaro en Köln. Oni decidis plilongigi la decidon de la 20 januaro 1929 ĝis 31 decembro 1930. Ĉe la novelektoj fariĝis estraro por ĉi tiu jaro : Hugo Oelbracht, Regina Reiff, Wilhelm Solzbacher; kontrolkonsilantaro : Peter Klein, Heinz Kolvenbach, Conrad Thoonen. Membroj ricevis specialan cirkuleron. Novaj membroj :

| | |
|------------------------|-------------|
| Hans Gottlob, Essen, | 10.— RM. |
| Friedel Volmer, Steele | 20.— RM. |
| Unuaj listoj | 1007.50 RM. |
| Sumo | 1037.50 RM. |

Aŭstralio.

Hawksburn. Laŭ « Suda Kruco » Esperanto-parolado kaj pli granda kurso en la katolika junulara unuigo.

Aŭstrujo.

Paca Ligo de Aŭstraj Katolikoj estas fondita laŭ iniciato de nia amiko Kaspar Mayr. La prepara komitato konsistiĝis el : Pastro D-ro Adamer, Salzburg; pastro D-ro K. Rudolf; pastro D-ro M. Pfliegler, S-ino D-ro M. Maresch, S-rino D-ro M. Anson, D-ro Oskar Katann, Kaspar Mayr kaj Ignaz Köck, el kiuj multaj ja estas konataj al ni pro ilia aktiveco en la junulara laboro. La fonda kunveno okazis la 10 marto en la cjo de Katolika Krucligo. Interesuloj skribu al K. Mayr, Wien XVII., Nachreihengasse 48.—

En **Katolika Krucligo de Wien** okazas du Esperanto-kursoj (por komencantoj kaj progresintoj) de Walter Mudrak, kiuj bone progresas. — Okazis Jara Kunveno de Katolika Krucligo, en kiu oni laŭlegis kaj multe aplaudis salutleteron de la Internacia Oficejo de MOKA. La kunveno estis vere ĝojiga kaj staris sub la influo de nia celado por pacifismo kaj Esperanto. Ĉeestis du pastroj-Esperantistoj : P. Pius Lenz, O. M. Cap., Linz, direktoro de Vincentinum, kaj P. D-ro Hohenwarter, direktoro de la Marianum en Klagenfurt. La du pastroj ankaŭ paroladis en la samtage okazinta ĝenerala kunveno de **Katolika Unuigo Esperantista de Wien**, parolante por Esperanto kaj atentigante pri abstinenco — do interesa reciproka propagando! — Pri la parolado de nia amiko D-ro Hohenwarter ni prenas el « Informoj » : « Li rakontis, ke li kiel prefeko de la seminario « Marianum » en Klagenfurt klopodis ĉiujare akiri kelkajn studentojn por Esperanto pere de ĉiujare aranĝita kurso. Kaj li povis ĉiam konstati ĉe la lernantoj grandan ĝojon pro la facileco de la lingvo. Pri sia sinteno al Esperanto la parolanto diris : « Mi estas feliĉa, ke mi konatiĝis kun Esperanto. Mi dankas al Dio, ke li donacis al mi novan idealon. — Mi konatiĝis kun Esperanto en la katolika paco-movado — mi estas konvinkita, ke Esperanto havos sian lokon en la mondo. Dank' al Dio la rimedo estas trovita, ke la popoloj povas reciproke konatiĝi, ke la naciismo finiĝos. — La Esperanto-movado certe iĝos grava parto de la Katolika Agado ». En kelkaj monatoj la fame konata pastro Stratmann faros en Wien propagandon por la katolika pacomovado. La parolanto petis la Esperantistojn katolikajn, kunhelpi en tiu agado. » — **En Katolika Krucligo** nia delegito Walter Mudrak faris paroladon (la 4 marto) pri « la sanga internacio de la armila industrio » (laŭ konata libro). — Gazeto « Heilig Feuer » denove enhavas bonajn atentigojn pri Esperanto kaj nia katolika paca movado.

Ĉeĥoslovakujo.

Boŝkovec. Katolika gazeto « Hlas Malého Petrika » eldonata de Pastro Strnad publikigis latinlingvan internacian eldonon, kiun oni povas senpage peti de la eldonejo; ĝi ankaŭ atentigas kaj atentigos pri Esperanto kaj MOKA; ĝia Esperanto-sekretario estas nia amiko Fr. Casar.

Francujo.

Charmont-sous-Barbuise. Nova del. M. Patrice de Rencourt de Longpré, aŭtoro de gravaj libroj.

Germanujo.

La **nacia sekretario** H. Kolvenbach (Düsseldorf, Stoffeln 23) dissendis diversajn cirkulerojn.

En la jara kongreso de **Katolika Junularo de Germanujo** okazinta en Altenberg fine de januaro la germanan nacian asocion de MOKA reprezentis tri delegitoj. MOKA estas plenrajta membro de tiu junulara branĉo de la Katolika Agado.

En gazeto « Die Junge Schar » nia Esperanto-kurso trovas grandan intereson. En la unua monato jam venis al la MOKA-oficejo 60 libromendoj, krome multaj libroj kaŭze de la anoncoj ricevis mendojn de lernolibroj.

Eksterlandaj vojaĝoj de katolikaj junularaj ligoj germanaj : « Sturmschar » (« Avangardo ») en Katolika Junvira Asocio okazigas migradon al kaj tra Islando, 4 aŭgusto-8 septembro, kaj al Italujo, 14-28septembro. Aligoj al Jugendhaus, Düsseldorf, Derendorferstr. 1. — **Katolika Junmetiista Asocio** aranĝas karavanon al la Internacia Katolika Junulara Kongreso en Budapeŝto en aŭgusto. Aligoj al Kath. Gesellenverein, Köln, Norbertstr. 12. — **Junulara Ligo de Katolika Komercista Asocio** okazigas studvojaĝojn al Belgio kaj al Anglujo en julio, al Aŭstrujo kaj Ĉeĥoslovakujo en aŭgusto. La germana nacia asocio de MOKA aranĝos ankaŭ diversajn studvojaĝojn kaj internaciajn limkunvenojn. Detaloj sekvos.

Bork i. W. Parolado pri MOKA de August Günther en Paca Ligo Katolika.

Köln. MOKA-grupo okazigis publikan paroladon de Donald Grant, ĉefsekretario de la Internacia Ligo por Interpaco, pri la temo « Pacaj taskoj de la junularo. Ideoj kaj spertoj el 15-jara laboro ». Pri tiu parolado de Donald Grant, kiu okazis parte en angla, parte en germana lingvo, la urba kaj universitata gazetaro raportis. Grant raportis el siaj praktikaj spertoj en Anglujo kaj Skotujo, Rusujo, Francujo, Aŭstrujo, Svisujo, Afriko, Hindujo, Aŭstralio kaj Novzelando. — **Esperanta Klubo en Kolping-domo** nun preparas novan Esperanto-ekspozicion okazontan en majo. Kiel nova prezidanto estas elektita nia amiko Max Henrichs. Kurso kun 25 partoprenantoj sub gvido de Sepp Saur.

« **Der Friedenskämpfer** » (« La Pacbatalanto »), organo de Paca Ligo Katolika rekomencis sian Esperanto-kurson.

Paca Ligo Katolika. En komitata kunsido okazinta fine de decembro en Berlino niaj amikoj Heinz Kolvenbach kaj Wilhelm Solzbacher estas elektitaj kiel membroj de la afergvidanta estraro.

Multaj jurnalaj publikigis niajn notojn. I. a. aperis artikoloj pri la dekjara ekzisto de nia movado en « Essener Volkszeitung », « Deutsche Reichs-Zeitung », « Der Friedenskämpfer » k. a.

Hindujo.

Sekve de interparolado de nia komitatano Regina Reiff kun D-ro Zacharias, fondinto de la katolika journalo « The Week » en Bombay, ni nun havas rilatojn bonan sukceson promesantajn.

Hungarujo.

Ni jam nun atentigas pri la Internacia Katolika Junulara Kongreso okazonta okaze de la Miljara Datreveno de Sankta Emeriko en Budapeŝto en aŭgusto. Gvidantoj de nia movado partoprenos kaj eble organizos specialan kongreskaravanon.

Hinujo.

Nia MOKA-asocio admiringe laboras! Aperis la unua numero de ĝia duonjara **nacia organo** en hina lingvo kaj Esperanto. Ĝi estas bela 36-paĝa multobligita kajero kun kolorita kovrilo, portanta orkoloran krucon, verdan stelon, nian devizon « Pax Christi in Regno Christi » kaj la hinajn naciajn standardojn, la ruĝan standardon kun la leviganta suno sur blua ĉielo. Bedaŭrinde mem ne sciante hian lingvon, la internacia sekretario de MOKA havis la bonŝancon iom tradukigi el la gazeto per japana pastro hian lingvon scianta. Gratulon!

Ankaŭ aperis la unua numero de la gazeto de la **Katolika Junulara Asocio de Hinujo**. Ĝi estas pli ol 120-paĝa kaj enhavas pli ol 13-paĝan artikolon de nia nacia sekretario Kao pri Esperanto (5000 hinaj karakteroj!), krome alvokon por kunlaboro en MOKA. Admirinda kaj imitinda laboro!

Fine persona sciigo : Nia nacia sekretario Joh. Bapt. Kao O. F. M. ricevis la 18 januaron la sakramenton de la sankta **paŝtrigo**. En la nomo de la tutmonda MOKA-anaro ni gratulas pastron Kao, nian karan kunlaboranton en la malproksima oriento. Lia agado estu imitata en multaj aliaj landoj!

Ni ankaŭ ricevis diversajn cirkulerojn de la nacia MOKA-sekretariejo (en ĥina lingvo).

Japanujo.

Okaze de vizito de la japana indiĝena jesuita patro H. Abe en Köln, nia internacia sekretario havis detalan interparoladon kun li pri la MOKA-laboro. Pastro Abe promesis fortan helpon, li jam nun korespondas kun amikoj en Japanujo pri agado en Japanujo kaj estos mem. kiam li post du jaroj reveturos denove al sia hejmlando, nia fidinda helpanto. — Ni esperu, ke, kiel en Ĥinujo, ankaŭ en Ĥindujo, Japanujo kaj aliaj landoj de la malproksima oriento nia movado ekprosperos. Nia movado ja ĉiam defendis la tezon, ke internacia agado ne rajtas esti nur eŭropa agado!

Latvuj.

Riga. MOKA-delegito kaj provizora nacia sekretario estas Henriko Freibergs, kursano de Pastro Ĉe.

Polujo.

Ni dankas nian amikinin Kazimiera Berkan en Poznan pro sendado de valoraj presajoj.

Rumanujo.

Provizora nacia sekretario estas Karoly Vigh, Cluj, Str. Universitatu 10.

Cluj. MOKA-grupo «Pax Christi» bone laboras. — El letero de nia delegito Simono Csora: «Kiel kursgvidanto kaj fondinto de la ĉi-tiea MOKA-grupo «Pax Christi» mi jen resume rakontas al vi, kio interesas vin. En la jaro 1926 mi aliĝis al MOKA kiel delegito (vidu J. B., n-04), sed dum du jaroj havante malbonan oficon en malgranda intermontara vilaĝo, mi povis labori nenion. Dank' al la bona Dio dum la pasintjara somero mi sukcesis trovi oficon ĉi tie, en la ĉefurbo de Transilvanio, mi povis fari ion por nia sankta ideo. Malgrandajo, sed kiel komenco bona sukceso. Jam mi ne estas sola, sed mi nun havas kunlaborantojn. — Pri la landa organizo ni ne povas paroli. Estas kelkaj izolitaj membroj, kun kiuj ni baldaŭ havos rilatojn. Momente ni ekzercas la lingvon kaj preparas nin al nova agado. Mi petas vin, ke la ĝisnuna neorganizita MOKA-movado ne timigu vin. Se vi iam venos al Transilvanio, ni atendos vin ĝoje kaj senpacience, kaj en ĉiuj urboj MOKA-anoj atendos vin...» El letero de UEA-sekretariino Eugenia Morariu: «En Cluj estas en preparo Esperanto-kurso por skoltoj, krome en alia rumana urbo, Timișoara, brava vicdelegito, s-ro J. Csapo, gvidas kurson por 105 gejunuloj, inter ili 60 skoltoj...»

Svisujo.

Stans. Nia del. W. Flammer anoncas bonan propagandon kaj baldaŭan pligrandigon de sia MOKA-grupeto.

Usono.

Je pasko aperos en la amerika katolika gazetaro kunmetajo («symposium») de artikoloj pri katolikaj paciaj ligoj en ĉiuj landoj, en ĝi ankaŭ artikolo pri MOKA. La sekretariino de la Katolika Paca Ligo de Usono sciigas nin, ke oni en la oficejo «kun granda intereso legas La Junan Batalanton».

LETERKESTO.

Ĉi tiu numero iom malfruigis, i. a. ĉar la alveno de la Letero de la Sankta Patro en lasta momento necesigis kelkajn ŝanĝojn en la kunmeto de la manuskriptoj.

La dua jarkolekto komenciĝos per la aprila numero. Ni esperas, ke ĉiuj gelegantoj tuj sendos sian abonkotizon.

Al W. F. (Svisujo), K. V. (Rumanujo), Pastro J. D. (Germanujo) k. a. Viaj artikoloj aperos en J. B.

E. M. (Rumanujo). La artikolo en la hungarlingra ĵurnalo «Ellenzek», pro kies alsendo ni dankas vin, tre mirigis nin. Ni unue pensis, ke ni erare ricevis numeron de 1921 anstataŭ de 1930. De Pastro N. el London ni jam de multaj jaroj nenion aŭdis.

Pastro M. M. (Svisujo). Vi deziras en via afabla letero al J. B. mil novajn abonemulojn. Bedaŭrinde ili ne venas de si mem. Mankas propagandantoj. Multaj MOKA-anoj dormas! Helpu, geomikoj!

Pastro P. C. (Ĥinujo). Nia koresponda servo nun funkcias sub gvido de Hugo Oelbracht, Düsseldorf, Flöherstr. 171, Germ. — Ni preparas specialan agadon pri korespondado kun misiaj landoj kaj ankaŭ pri korespondado pri pli seriozaj temoj.

Internaciaj manlibroj. Mi rekomendas: Oficiala Jarlibro de la Esperanto-Movado (UEA, Genève); The Statesman's Yearbook (London); Europa Yearbook (London); Annuaire de la Société des Nations (Lausanne); Internacia Labora Jarlibro (Genève, en franca, angla kaj germana lingvoj); Annuario Pontificio (Roma); Annuaire Pontifical (Paris); Catholic Directory (London); Annuario dell' Azione Cattolica (Roma); Kirchliches Handbuch (Freiburg); Roznicki Katalicki (Poznan); Manlibro de Katolikaj Organizajoj (en Roma, M.-Gladbach kaj Paris, en itala, franca, germana kaj angla lingvoj, bedaŭrinde nur 1 eldono de 1923). W. S.

RECENZEJO.

Denys P. Myers, Nine Years of the League of Nations. World Peace Foundation, Boston, U. S. A. 1929, 220 pĝ., 40 cendoj.

George H. Blakesley, The Pacific Area, An Intenational Survey, sama eldonejo, sama prezo, 224 pĝ.

Du bonegaj verkoj por ĉiu internacie interesito. La unua montras la historion de la Ligo de Nacioj. Mi legis centojn da libroj pri tio, sed apenaŭ iun, kiu informas tiel klare kaj koncize. — La dua skizas la politikan kaj ekonomian problemaron de la landoj ĉirkaŭ la Pacifika Oceano, kiu bedaŭrinde ankoraŭ tute ne estas vere «Paca Oceano», ĉar en ĝi ankoraŭ dormas gigantaj konfliktoj de la «stonteco». Blakesley, kiu estas profesoro de historio kaj internaciaj rilatoj en la Clark-Universitato, bonege kunmetis la materialon. Jen kelkaj el la problemoj pritraktitaj: Ĥinujo kaj la mondpotencoj, Ĥinujo kaj Usono, Ĥinujo Angelujo, Ĥinujo kaj Japanujo, Ĥinujo kaj la Soveta Unuiĝo, Japanujo kaj Rusujo, Japanujo kaj Usono, Aŭstralio, la problemoj de Mangurio kaj de la manguria fervojo ktp.

Przywara, Erich S. J., Christus lebt in mir. 8-0 XXI + 60 pĝ., Freiburg 1929, Herder, kartonite 1.70 M.

«Kristo vivas en mi!» anstataŭas la iaman libron «Eŭkaristio kaj laboro» de la sama aŭtoro, kiu iam eklumis en la komencoj de la katolika movado. Profundaj kaj liturgiaj pensantaj homoj legu ĝin!

Frau und Volk, Beiträge zu Zeitfragen von Maria Rigel, Klara Philipp, Dr. Maria Schwartz, Franziska Hornung, Elisabeth Stoffel, Clara Siebert, 8-0, XIII + 124 pĝ., Freiburg 1929, Herder, kart. 2 M.

Niaj junulinoj germanan lingvon komprenantaj devus legi tiun libron montrantan la virinon en la publika vivo. La eldonantino Clara Siebert, membro de la badena parlamento, estas bone konata al ni kiel energia pacifistino kaj estrarano de la Paca Ligo Katolika. En sia «Letero al Sankta Radegundis» enpresita en la nomita libro ŝi elparolas sian konfesion al internacia paco. La aldono donas interesajn statistikojn kaj informojn.

Handbuch des Katholischen Gesellenvereins, Verlag des Gesellenvereins Köln 1929, 216 pĝ., bind. 5. - M.

Jen bonega manlibro montranta la internacian staton de la tutmonda Kolping-familio. Ni pri tio parolos en speciala artikolo. La manlibro estas grava por gvidantoj de katolikaj junulaj asocioj.

Filchner, Wilhelm, In China. Auf Asiens Hochsteppen. Im ewigen Eis. Reenrigardo al 25 jaroj da laboro kaj esploro. Kun 39 bildoj, 19 kartoj kaj letero de la Regna Prezidanto v. Hindenburg XIV + 202 pĝ., Freiburg 1930, Herder, 6 M., kart. 650 M., tolbind. 7.80 M.

La famkonata Tibet-esploristo rakontas al ni el siaj laboroj. En pentrinda variceo ni lernas multe pri la bela Ĥinujo, la mistere fermita Tibeto, pri la glaciaj regionoj de Spitzbergen, pri Konfucianismo, Islamo, Budhismo. La junularo ĝojos pri tiu libro!

Sträter, Dr. Herm. Jos., helpepiskopo, Priester und Franziskusideal, kun titola bildo 2-a eldono, 12-0, VI + 40 pĝ., Freiburg 1929, Herder, 0.75 M.

Episkopo Sträter parolas al siaj pastraj kunfratoj pri Sankta Francisko kaj farigas elokvanta interpretanto de la Sankta Malriculo.

Paca Ligo de Germanaj Katolikoj

(Friedensbund deutscher Katholiken)

varbas pri via kunlaboro.

Kion ni volas ?

Ni volas kunigi ĉiujn germanajn katolikojn, kiuj ekkonis, ke venonta milito minacigas la perein de Eŭropo, kiuj estas decidintaj savi la estontecon kaj la pacon de Eŭropo kontraŭ la demonoj de milito, kiuj tial estas pretaj kunlabori en la katolika paca movado en harmonio kun la manifestadoj de la papoj kaj la direktivoj de la episkopoj.

Kion ni donas al vi ?

Monate la ampleksan kaj valoran gazeton « DER FRIEDENSKÄMPFER » (« La Pacbatalanto », la redakcion gvidas Walter Dirks en Frankfurt a. M.). Kvaronjare la populare verkitan gazeton « DER FRIEDENSFREUND » (« La Pacamiko »). Ambaŭ gazetoj informas vin regule pri ĉiuj gravaj problemoj de la paca movado. Se vi aligas al loka grupo de nia Ligo (ekzistas en Germanujo ĉ. 100 lokaj grupoj), vi havas la eblecon viziti la kunvenojn kaj laborkomunumojn de tiu grupo.

Favora propono :

Por tri monatoj vi ricevas nian gazeton tute senpage kaj sendevige, por ke vi povu informigi pri nia laboro. Sciigu al ni ankoraŭ hodiaŭ vian adreson kaj mendu ĉi tiun senpagan provabonon !

Friedensbund deutscher Katholiken, E. V.

Oficejo :

Frankfurt a. M., Liebfrauenberg 37, Germ.